

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = cendoj 75
= frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.

Pago por anoncoj:

15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
8 kopekoj — por daonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Upsala, Sverige.* (Svedujo.)

III:a jaro.

Decembro 1898.

N:o 12 (36).

Al ĉiuj abonantoj de la gazeto Lingvo Internacia.

En la laste pasinta tempo aperis al ni la grava demando pri la daŭrigo aŭ ĉeso de nia gazeto L. I.

S-ro V. Gernet, kiu ĝis nun estis la mona mastro de la gazeto kaj aŭ partoprenis en la redaktado, estis pli kaj pli okupegita pro siaj privataj laboroj. Li jam ne havas eblon daŭrigi la mastradon de la gazeto.

La Klubo Esperantista en Upsala, kiu eldonadis ĝin, havas inter siaj membroj nur malmultajn kiuj restadas ĉiujn monatojn de jaro en la urbo Upsala. Inter tiuj personoj neniu povis preni sur sin la tutan zorgon pri la gazeto.

En tiuj cirkonstancoj s-ro Gernet kaj la Klubo Upsala penadis trovi ian novan rimedon por daŭrigi la eldonadon. Ne povante tuj decidi pri tiu ĉi demando, antaŭ ol ĉiuj rimedoj estis provitaj, ili prokastis la presadon de la decembra numero, kiu estus la lasta, por eldiri en ĝi sian finan vorton. Malprosperis iliaj klopodoj. Tial la Klubo prenis tiun ĉi decidojn jen citatan.

19 Marto 1899.

La gazeto Lingvo Internacia estas eldonita dum la jaroj 1896, 97 kaj 98 de l' Klubo Esperantista en Upsala, sed sur la risko precipe de s-ro V. Gernet en Odessa. De nun s-ro G. ne trovas eble plu porti la riskon kaj proponis al d-ro Zamenhof en Varsovio preni sur sin kaj la zorgon kaj la riskon de la gazeto, kiu estas por nia esperanta mondo videble necesa. D-ro Zamenhof do proponis al la red. de L'Espérantiste la redaktadon kaj eldonadon de l' nomita gazeto en la maniero ke L'Espérantiste enhavos ĉiam aldonon, en kiu oni legas en esperanta traduko la francajn artikolojn de L'Espérantiste. Tiu ĉi aldono povus esti abonata aparte.

La Klubo Esperantista en Upsala kiu devas esprimi sian opinion pri tiu proponita ŝanĝo deziras elparoli sekvantan:

La Klubo en principo nenion havas kontraŭ tiu aranĝado.

La Klubo estas konvinkita ke L'Espérantiste faros, kiel ĝis nun faris, grandan servon al nia komuna ideo, kaj kun granda plezuro vidas la ĉefan kondukadon de l' afero Esperanto en la manoj de niaj laboremaj, ĉergiaj francaj amikoj, precipe en la manoj de l' redaktoroj de L'Espérantiste, kies sukcesa laboro vekis miron en la tuta esperantista mondo.

La Klubo sekve decidas ke la gazeto ĝis nun eldonita de ĝi devas finiĝi almenaŭ en ĝia nuna formo (16-paĝa kajero ĉiumonate) kaj petas ĉiujn siajn abonantojn transporti siajn abonojn al L'Espérantiste kaj doni al tiu nomita gazeto sian plenan subtenon kiel antaŭe al la nia.

La Klubo tamen rezervas por si mem la rajton en la estonta tempo eldoni folieton, eble sub la sama titolo kiel nia antaŭa gazeto, sed de malgranda amplekso kaj kosto.

Por la Klubo Esperantista en Upsala, subsignas

Alfr. Sandborg,
anstataŭ sekretario.

Valdemar Langlet,
Klubestro.

Tiel staris la demando antaŭ kelkaj tagoj, kiam la lasta numero estis jam preskaŭ preta.

Tiam ni ricevis de unu varma amiko de nia ideo la ĝojigan proponon, ke li prenas sur sin la eldonadon de la gazeto L. I.

Tiu ĉi sinjoro pensas, ke la ĉeso de l' ĝisnuna centra organo de la esperantistaro estos juĝita de la neesperantistoj kiel argumento pri netaŭgeco de la lingvo mem, kaj estos tro danĝera por nia ideo kaj lingvo.

Tial li proponas revivigi la eldonadon de L. I. je la jenaj kondiĉoj:

Li mem sola estos respondeca por ĉiaj kostoj kaj promesas pagi ĉian eble fariĝontan mankon ĉe la fino de l' jaro, kaj cetere zorgas pri ĉio, kio tuŝas la ekonomian flankon de la gazeto.

Ĝi estos presata en Luleå, Svedujo. Tie sin trovos la ekspedejo de L. I., kiu zorgos pri abono, dissendado, reklamo, anoncoj, korespondado pri tiuj ĉi aferoj k. c.

Al la ĝisnuna redaktoro en Upsala li proponas la zorgon pri la enhavo, la teksto de la gazeto.

Ne akcepti la malavaraĵn kondiĉojn de tiu ĉi varma samideano estus nepardonebla peko, kaj la redaktoro tuj forpelis ĉian maldecidemecon, kvankam li en la lasta tempo, rimarkinte kiom malmulte li kapablas, se li estas lasita preskaŭ kun si sola en la laboro, al kies plenumado ofte mankas la tempo kaj libereco, estis sentinta la malbonon de la malpovo, sentis ĝin, kiam numero post numero estis malfruigita spite ĉiaj klopodoj, sentis ĝin, kiam la amaso da neresponditaj leteroj kreskis pli kaj pli sur lia tablo, sentis ĝin, kiam li vidis ke amikoj de nia ideo malvarmiĝis en sia fervoro — eble pro lia malpovo.

Amikoj, esperantistoj! Revivigu vian intereson por la gazeto! Rekomencu ni komune la laboradon kun novaj fortoj kaj pligrandigita sperto!

Nia franca kolego, L'Espérantiste, kiun ni varme kaj sincere rekomendas al ĉiuj, estu la propagandilo eksteren por varbi novajn adeptojn kaj detruu la fortikaĵojn de la kontraŭuloj; Lingvo Internacia estu la ligilo kaj fortigilo interna de la esperantistaro.

Ambaŭ havas sian regionon de agado, sian specialan farotaĵon, kaj ne malhelpas unu la alian. Ni estas konvinkitaj, ke la Aldono de L'Espé-

rantiste estos tiom same bonveninta al ĉiuj ankaŭ nun, kiam Lingvo Internacia daŭrigos sian aperon.

La unua numero de la daŭrigo estos publikigita tuj kiam la nova presejo posedos la necesajn literojn.


Fine, ni petas la pardonon de niaj abonantoj pro la granda malfruigo de tiu ĉi numero. Ni jam diris la kaŭzon.

Ankaŭ petas ni ilian pardonon pri la malrapida publikigo de antaŭaj numeroj, dependanta ĉefe de tio, ke ĉiu numero devis esti sendita de Upsala al Odessa kaj returne por tralego antaŭ la presado.

La Redakcio.

Observu! Tiuj personoj, kiuj sendis abonan pagon por L. I. 1899, volu sciigi la Klubon en Upsala, ĉu ili deziras ricevi por tiu mono la daŭrigon de la gazeto, aŭ ĉu ili postulas, ke ilia mono estu resendita al ili.

La Redakcio.




Iaj pensoj pri la rifuĝo al la oferemeco de la esperantistaro.

En la pasinta somero mi havis la feliĉon interparoli kun unu el la malnovaj, provitaj esperantistoj, kiu batalis jam en la antaŭpostenaj skermadoj, kiu laboradis kaj laboradas senbrue kaj silente por la progreso de nia lingvo, kaj akiris dum tio spertecon respektindan. Li vekis ĉe mi unu penson, kiun mi volas nun komuniki al niaj amikoj.

Li parolis pri la ofte ripetata rifuĝo al la oferemeco de la esperantistaro; ĝi fariĝas tro ofta kaj pro tio danĝera. Se novaj adeptoj, al kiuj ni rekomendas la gazeton, demandas nin, ĉu la abona pago estas la sola elspezo, ni ne povas juste doni jesan respondon, ĉar kun ĉia nova projekto kaj entrepreno oni turnas sin al ĉiuj esperantistoj — tio estas: al ĉiuj abonantoj de la gazeto — kun peto pri mona helpo. Mi pensas, ke mia interparolinto ne estas tute malprava. Ni devas ĉiam memori, ke la plejmulto de la esperantistoj ne estas riĉuloj, ke per troŝarĝo ili riskas perdi sian povon kaj volon doni. Tial — antaŭ ol ni alvokas la monan helpon de la esperantistaro, ni bone konsideru, ĉu la intencata entrepreno eble povos alie aranĝiĝi.

Paul Nylén.



Projekto pri rusa-esperanta gazeto.

Ni ricevis de s-ro A. Zakrjevski en Arĥangelsk "alvokon al la esperantistoj", sed ni ne povas nun enpresii ĝin *in extenso*. S-ro Zakrjevski kaj la Arĥangelskaj esperantistoj volas fondi, por la propagando de Esperanto en Rusujo, gazeton rusa-esperantan, analogian al la franca "Espérantiste"; sed ne havante la monon necesan, ili povos efektiviĝi sian projekton nur se ili kolektos almenaŭ 200 abonojn; kaj eĉ en tiu okazo, la kosto de l' abono estus ankoraŭ 5 rubloj (= 12 fr. 50), kio ŝajnas al ni tro multekosta. Esperantisto, kiu deziras sekvadi detale la progresojn de nia afero, devas jam aboni kelkajn gazetojn; kaj kvin rubloj estas granda pliigo de la budĝeto por tiu ĉi celo.


Sed la afero havas ankoraŭ unu flankon plu. Sinjoro la projektinto estas varma, agema apostolo de nia lingvo, sed li ankoraŭ ne transpaŝis la staton de komencanto. Tio ne estas ia peko, tute neniel, sed la publikigo de nacia gazeto por nia lingvo, precipe en tiu ĉi lando, estas entrepreno tiom grava, ke ĝi absolute ne devas riski ian malsukceson. En tiu ĉi lando sin trovas tiel granda nombro da malnovaj, lertaj esperantistoj; iliaj manoj konduku tian entreprenon.

Krom tio Arhangelsk estas loko tro malcentra kiel ĉefurbo de la propagando.

Ni samopinias kun "L'Espérantiste", ke la cirkonstancoj aparte malfacilaj, en kiuj sin prezentas tiu ĉi projekto, ŝajnigas al ni ĝian rezultaton kiel tre malcertan.

Ni rigardas tamen tiun ĉi projekton kiel la unuan paŝon en la direkto al la celo dezirata: la demando estas alportita al priparolado. Ni esperas la plej bonan solvon de ĝi.

Volu adresi ĉiujn komunikaĵojn pri tio al s-ro A. Zakrjevski, Troickij prospekt, dom Ananina, Arhangelsk (Rusujo).*)



Novajoj.

Portreto de D-ro Zamenhof.

Diversfoje kaj jam de longe multaj el niaj amikoj esprimis al ni la deziron havi la portreton de la glora aŭtoro de Esperanto. Nun ni povos ilin kontentigi. S-ro K. Ostanieviĉ, sekretario de Espero en S.-Peterburgo, prenis sur sin fari belan eldonon da portretoj de D-ro Zamenhof. La portreto mem, farita per zinkografia sistemo imitanta la gravuron, havas la formaton de ĉirkaŭe 9×13 centimetroj, kaj estas presita sur bela papero de formato 15×22.

La kosto de la portreto estas 0.75 fr. krom poŝtpago por transsendo.

La malgranda profito ricevita per la vendo de tiuj ĉi portretoj estos sendata al D-ro Zamenhof por la bezonoj de nia afero.

Oni povas mendi ĝin per la Klubo Esperantista en Upsala, aŭ la sekr. de la Societo por la prop. de Esp. R. Lémaire, aŭ ĉe s-ro Ostanieviĉ.

* * *

Vojaĝoj de Esperantistoj.

S-ro W. H. Trompeter sciigis nin en privata letero, ke li sendube efektigos sian intencon vojaĝi ĉirkaŭ la 1:a de Februari 1899 al Ameriko, por vidi parton de la Unuigitaj Ŝtatoj.

* * *

Ni ricevis malfrue la sciigon, ke la 20/2. VI/VII. 1898 mortis en Voroneĵ, Rusujo, en profunda aĝo, de doloro de pulmoj, unu el ne senkonataj esperan-

*) Post ke tio ĉi estis komposita, s-ro Z—i sciigis nin, ke la intencata gazeto, kies nomo estos "Esperanta Kuriero", estos ĉiusemajna kaj kostos, kun transsendo, 8 rublojn jare.

tistoj, la aŭtoro de nun jam neekzistanta la broŝureto en rusa lingvo sub titolo "Vsemirnoje djelo" (tutmonda afero), s-ro *Vasil Lvoviĉ Kravcov*.

* * *

Kelke da membroj de la societo "Espero" en S. Peterburgo kunigis sin en rondeto por eldonadi diversajn verkojn pri kaj en esperanto. Ĉefa redaktoro de tiuj eldonoj estas sinjorino Anna Polnickaja, aliaj redaktoroj: V. Rogaĉev Antonov kaj P. Ĵarnovskij. Loko de la laboroj de tiuj ĉi redaktoroj estas la loĝejo de s-ro Ĵarnovskij (S. Peterburgo, Sergievskaja 17, loĝejo 21).

* * *

Filio "Espero" Arĥangelsk.

Protokolo (kopio) de la unua komuna kunveno de membroj de la Arĥangelska Filio de l' S.-Peterburga societo "Espero", kiu havis lokon en la salono de la Arĥangelska magistrato je la 21 Novembro (m. n. stile) 1898 jaro.

1. En la kunveno apudestis el la nombro de sep membroj-fondantoj ses: s-roj A. Zakrĵevski, N. Sokolov, T. Ŝilov, V. Ignatov, N. Ĉulkov kaj s-rino A. Revaldt.

2. La kunveno estis malkovrita, en la unua horo kaj 30 minutoj de la tago, per la elekto de prezidanto, kiun unuvoĉe estis elektita membro-fondanto A. Zakrĵevski.

3. Laŭ la propono de l' prezidanto, la membro-fondanto N. Ĉulkov havis longan paroladon, en kiu li konatigis la apudestantajjn gastojn kun la lingvo Esperanto.

4. Post la parolado, la prezidanto tralegis la regularon de la societo "Espero" kaj la regulojn por la filioj de tiu ĉi societo; post kio estis proponitaj por preparado la sekvantaj demandoj.

a) *Difino de la membra jarpago*; per la kunveno la membra pago por la efektivaj membroj kaj m. korespondantoj estis difinita en mezuro de du (2) rubloj ĉiujare, kaj por la membroj-helpantoj laŭ ilia deziro, sed ne malpli ol 50 kop. (ĉiujare).

b) *Trarigardo de la petskriboj* de s-roj Ivanovski kaj Rukin, pri ilia deziro eniri en la nombron de membroj efektivaj de la Filio. La kunveno unuvoĉe elektis ilin ambaŭ efektivajn membrojn.

c) *Elektio de la prezidanto kaj membroj de la komitato de l' Filio*. Prezidanton oni elektis s-ron A. Zakrĵevski, kaj membrojn de la komitato: N. Ĉulkov sekretario, T. Ŝilov kasisto, N. Sokolov bibliotekisto, V. Ignatov, A. Ivanovski.

5. La kunveno estis finita en la 2 horo 40 minutoj de la tago.

Pro sekretario: *Ignatov*.

Prezidanto: *A. Zakrĵevski*.

Aldono. De la 1 Jan. 1899 anstataŭ s-ro Ĉulkov, kiu ne povis daŭrigi la oficon de sekretario, estis elektita s-ro Ignatov.

Personoj dezirantaj eniri la Filion, volu turni sin rekte al la prezidanto. Adreso lia kaj de la Filio estas: Troickij prospekt, domo de Ananĵin. Arĥangelsk. Rusujo.

* * *

El Sibirujo Orienta skribis al ni en Januaro 1899 s-ro Aleksandro Vasiljeviĉ Plusnin en *Habarovsk* interalie: "Mi povas komuniki, ke la lingvo internacia eksonis jam ankaŭ tie ĉi, preskaŭ sur la bordo de l' Oceano Granda.

En nia urbo estas kelkaj adeptoj de tiu ĉi granda afero, kaj ni tre dezirus elŝanĝi vorteton kun niaj pli malnovaj kunfratoj de Eŭropo. Por 1899-a jaro ni mendis la gazetojn L. I., Petit Bleu, l'Espérantiste, kaj ni intencas ek-komunikiĝi kun Japanujo, kie ankaŭ ni esperas trovi esperantistojn. Nia malfeliĉo estas en tio, ke ĉion, kion ni mendis el Eŭropo, ni ricevas, nur post du monatoj post desendo."

* * *

Esperantigo de stenografiaj metodoj.

En la decembra numero de "*La Plume Sténographique*" ni legas, ke la ĉef-redaktoro de tiu gazeto, s-ro F. Canet, ĵus faris konformigon originalan de la stenografio Duplŭajea al nia lingvo, aperontan baldaŭ en broŝuro. Redaktita en esperanto, tiu konformigo estos do atingebla por ĉiuj esperantistoj de la tuta mondo.

La kosto de la broŝuro, kun transsendo, estos 1,50 fr. Oni povos mendi ĝin de nun ĉe la administrejo de "*La Plume Sténographique*", 11 Rue Manique en Limoges, Francujo.

La sekretario de la Klubo Esperantista en Stokholmo verkis kaj eldonis broŝureton titolitan: "*Stenografio Internacia laŭ la principoj de Doktoro Julius Brauns, Hamburg. Per helpo de W. Brauns, Halmstad, Svedujo, esperantigita de P. Ahlberg, Stockholm, 1899.*"

La verko estas ricevebla ĉe la aŭtoro. Kostas 25 öre (35 centimoj). En la nomaro ĝi portas la numeron 119.

* * *

Esperanto kaj medicinaj societoj.

S-ro Kazi-Girej laboradas senlaciĝe por nia lingvo inter la medicinistoj. Daŭrigante liajn sciigojn donitajn en nia antaŭa n-ro, li raportas:

"Nun mi min turnis kun la propono tralegi tiun saman artikolon (la "alvoko" el n-ro 6-7 de "L. I." en rusa traduko) per unu kuracisto, loĝanta en Orel, al tiea Medicina Societo, kaj ricevis ne sole tute favoran respondon, sed ankaŭ la peton elsendi la necesan materialon por ellerni la lingvon. Tiamaniere la artikolo baldaŭ estos tralegita en la Medicina Societo de Orel. Post tio ĉi mi nun esperas aranĝi tion saman en la urboj Tambov, Ĥarkov kaj Rostov-na-Donu.

La redakcio de la medicina ĵurnalo "*Medicinskaja Beseda*", eldonata de Voroneĵa Medicina Societo konsentis preni sur sin la ĉiaman disvendadon de esperantaj eldonoj en la urbo Voroneĵ, — kaj la afero jam estas nun aranĝita."

* * *

La libro pri Rusujaj vojaĝoj de V. Langlet.

Krom la 23 mendoj nomitaj sur la paĝo 146:a, la sekvantaj personoj anoncis sian deziron aĉeti tiun libron: s-roj Kazi-Girej 10 ekz., Paŭlo Tenneson 1, Vl. Moroz 1, Aug. Laurén 1. Sumo: 13 + 23 = 36 ekz.

* * *

Kursoj pri Esperanto.

Per "L'Espérantiste" ni havas la sciigon, ke s-ro F. Canet, direktoro de la "*Plume Sténographique*" en Limoges (Limoj) ricevis la rajton instrui

nian lingvon ĉe la Lernejo praktika de l' komerco kaj de l' industrio, en tiu ĉi urbo. Tiu sukceso, preparita per lia propagando kaj la tiel fervora kunlaborado de F-ino Zabilon d'Her, portas en si promeson pri bona estonteco por nia lingvo en tiu regiono de Francujo.

Ĉe la Unuiĝantaro de ekslernantoj de la Brusela Lernejo Industria s-ro Ed. Blanjean, en la dimanĉo 11 Decembro pasinta, havis paroladon, kiu ricevis grandegan sukceson. La aŭdantaro da ĉirkaŭe 200 personoj donis senĉesajn aplaŭdojn.

La 9-an de Januaro s-ro B. komencis novan kurson ĉe la Grupo Esperantista de l' Brusela Klubo Poliglota.

* * *

Sveda propagandilo.

La societo "Studentoj kaj Laboristoj" — klubo kies celo estas forigi ĉiajn afektitajn barojn inter la popolklasoj kaj tiel proksimigi la nivelon de klereco de homoj malegale situaciitaj — publikigis jarlibron de 1898, kie s-ro S. E. Krikortz enportis verkon, titolitan "Esperanto, unu neŭtrala lingvo."

Tiu ĉi verko estas presita ankaŭ kiel aparta broŝuro (16 paĝoj de formato iom malpli granda ol "L. I."), kiun ni rekomendas al niaj svedaj amikoj kiel bonan propagandilon inter svedlingvanoj. Unu ekzemplero kostas 10 oerojn, dek ekz. 50 oerojn. Ricevebla ĉe la Klubo Esperantista Upsala ka ĉe la Klubo Esperantista de Stokholmo.

* * *

Aperonta verko.

La varma amiko de nia lingvo s-ro Paŭlo Lengyel en Szegzárd, Hungarujo, eldonos en la daŭro de tiu ĉi somero — kiel niaj legantoj sciigis per la almetaĵo dissendita kun la novembra numero — kolektaĵon da humoreskoj kaj anekdotoj kun la titolo "Libro de l' humoro". Ĝi estos la unua speciale humorista verko en la Esperanta literaturo. Ni forte rekomendas ĝin al ĉiuj.

Ĉar la apero de tiu ĉi numero tre malfruiĝis, la aŭtoro sciigas ke: Pro mallongeco de limtempo pri abono je mia eldonota "Libro de l' humoro" mi plilongigas ĝin. Do mi petas ĉiujn Esperantistojn, ili volu fari la abonojn sub *unu monato* post ricevo de tiu ĉi numero de l' "Lingvo Internacia". Adreso: Szegzárd, Hungarujo. Kun granda estimo *Paŭl Lengyel.*

* * *

Kie mendi verkojn esperantistajn? Ĉiam ili estas riceveblaj ĉe la estiminda D-ro *L. Zamenhof*, adr.: ulica Dzika N:o 9, Varsovio, Rusujo. Pro manko de spaco ni ne povas presi tie ĉi la nomaron de Esperanta literaturo, tian nomaron oni mendu ĉe la Klubo Upsala.

Restantaj jarkolektoj de la gazeto "Esperantisto" de 1893 kaj 1894 estas riceveblaj ĉe s-ro W. H. Trompeter kaj s-ro Adolf König, ambaŭ kies adreso estas: Schalke, Westfalen (Germanujo).

* * *

Pri Esperanto parolis. La gazeto "*Hjulsport*", oficiala organo de la sveda ligo velocipedista kaj de kelkaj el la grandaj kluboj de Svedujo, publikigis en sia n-ro 45 sub la rubriko "literaturo" sciigon pri "Lingvo Internacia" kaj pri Esperanto en vortoj tre simpatiaj.

— En *“Upsala Nya Tidning”*, n:ro 1219, la 23 de nov., estas presita en sveda traduko la plej granda parto de la artikolo “Kongresoj kaj Esperanto”, kiun s-ro Henri Bel skribis por la oktobra n:ro de *“L’Espérantiste”*.


— La svedalingva ĉiutaga gazeto *“Östra Finland”*, eldonata en Viborg, publikigis en sia n:ro 277 de la 29:a de nov. tre longan ĉefartikolon, rubrikitan “Esperanto, universala lingvo?” Tiu artikolo, enpresita danke al nia samideano s-ro Henrik Backlund, estas tre lerte kaj konvinke verkita.

— *“La Plume Sténographique”* sciigas en sia decembra numero, ke ĝia kolego *“Le Sténographe de l’Est”* antaŭ nelonge dediĉis artikolon rimarkindan al nia lingvo.

— La bonega sveda jarlibro *“Almanack för alla”* (almanako por ĉiuj) de 1899 enhavas ankaŭ, sub la rubriko “La lingvo internacia Esperanto”, la ĉefajn trajtojn de la gramatiko de nia lingvo. Tiu jarlibro, kiun posedas ĉiu klera svedo, alportos al ĉia hejmo la konigon je Esperanto pli bone ol iaj broŝuroj aŭ gazetaj artikoloj.

— N:ro 333 de la Finlanda gazeto *“Nya Pressen”*, 7. XII., sciigas, ke unu antaŭ nelonge publikigita kajero de ia rusa ĵurnalo enhavas artikolon verkitan de angla scienculo H. Ellis pri la internacia lingvo de la estonta tempo. La lingvoj mortintaj kaj la artaj lingvoj kiel volapük kaj esperanto ne povos, laŭ lia opinio, plenumi tiun rolon. Li opinias, ke la hispana estos la plej oportuna. La angla lingvo, pensas li, ne taŭgas, ĉar ĝia elparolo tion malhelpas. La cirkonstancon, ke Anglujo havas la plej grandan nombron da *balbutuloj* en la mondo, li juĝas kiel sekvon de la strangejoj de la lingvo. La linoj, kiuj havas lingvon tre ritman, neniam balbutas. Ekzistas diro de unu filologia aŭtoritato, ke “nenia popolo en la mondo elparoladas tiel malbone sian lingvon kiel la angloj”. Krom tio ĝi estas tre diversaforma, ĉar la lingvo de la pli altaj popolaj klasoj tiel diferencigas de tiu de la malaltaj tavoloj de la popolo, ke ili nur malfacile komprenas unu la alian.

Ĉu sinjoro Havelock Ellis konas Esperanton? Ni ne scias, sed ni kredas ke ne.



Nia celo.

Unu vorto al ĉiuj esperantistoj.

En la lasta tempo ni legis en la paĝoj de Lingvo Internacia artikolojn, kiuj sendube estas tre maloportunaj, ĉar ili tro multe disigas niajn fortojn.

Ni legis en unu numero proponon konstrui “esperantistajn hotelojn” kaj en alia numero respondon al tiu ĉi propono, kia respondo proponas fondi societon, nomatan Ligo de Gastamo.

Senpartie pripensante la proponojn, neniu povas diri alie ol: la celoj de la aŭtoroj estas tre bonaj, sed — bedaŭrinde — ne fareblaj — almenaŭ en nuna tempo. Ĉiuj monoj, kiujn la esperantistaro povas akiri, estas necesaj por nia gazeto kaj por la propagandado. Mi demandas: Kion dirus la esperantistoj, se la gazeto ne estus eldonata, ĉar mankas mono al la gazeto?

Cetere estas aferoj, pli necesaj ol “esperantistaj hoteloj” kaj “hospitium”, aferoj, kiuj pli rekte kondukas al nia granda celo: la disvastigado de la lingvo internacia Esperanto.

Antaŭen, *antaŭen*, **antaŭen** estas nia signaldiro. Kiam ni kalkulos la anojn de l’ lingvo Esperanto en centmiloj anstataŭ en miloj, tiam estos la tempo konstrui esperantajn hotelojn. Por ke ni povu tiel ilin kalkuli, estas tute necese, ke ni posedu sanajn fortojn unigitajn por la sama celo.

Mi scias, ke estas multaj esperantistoj; kiuj koleras je miaj vortoj — vortoj de persono, kies nomo ne estis legata en la paĝoj de tiu ĉi gazeto, sed kiel mi pensas, mi ankaŭ diros.

Ni, la esperantistoj, ne devas esti fantastoĵoj, sed homoj pretaj fari ĉion eblan por la ideo: Lingvo Internacia Esperanto. Ni montros al la mondo, ke en la momento, kiam ni prenis al ni la nomon esperantisto, ni ankaŭ


prenis sur ni fari, ke nia lingvo estu disvastigata inter ĉiuj popoloj, ni promesis labori, ke ĉiuj homoj — kleraj kaj malkleraj — vidu, ke nia lingvo estas la plej bela, la plej riĉa, la plej facila lerni, la plej oportuna kiel internacia lingvo inter ĉiuj lingvoj, vivantaj kaj mortintaj.

Tiu ĉi estas la granda celo de ĉiuj esperantistoj.

Antaŭ ol ni atingis ĝin, ni ne devas havi aliajn celojn por niaj okuloj.

Agento de l' lingvo internacia Esperanto

Hjalm. Bäckström. Luleå, Svedujo.



Arteco de lingvoj.

Tre ofte oni renkontas la esprimon: *arta lingvo esperanto*.

Kiam vi parolas kun homo konanta nek la ideon de lingvo internacia, nek la lingvon esperanton kaj diras, ke esperanto estas lingvo arta, al li tuj venas kapon la ideo, komparadi artan lingvon kun artaj piedoj, nazoj, eĉ okuloj, kaj li tuj komencas paroladi pri maloportuneco de artaj lingvoj.

Laŭ logiko, ĉiuj naciaj lingvoj estas *artaj*; diferenco inter ili kaj esperanto estas sole, ke ĉiuj lingvoj estas konstruitaj blinde, senregule per centjaroj kaj per amasego da homoj, lingvo de esperanto estas konstruita laŭ severa logiko per unu geniala homo kaj en malgranda ero da tempo.

Se ĉiuj naciaj lingvoj estus naturaj kiel koloro de okuloj aŭ haroj, tiam infano, kies patro estis rusa kaj patrino franca, devus paroladi en dialekto ruso-franca.

Kiela estus tiu ĉi dialekto, mi ne povas eĉ imagi... *).

Laŭ logiko esperanto estas lingvo ne *arta*, sed *nova*, kaj esperantistoj devas tute eljeti la esprimon: lingvo arta, kiel maloportuna al ilia afero.

Mi diros pli. Laŭ mia opinio esperanto ne estas elpensajo, kiel fonografo k. t. p., sed geniala eltrovo, kiel la eltrovo de Koperniko. Esperanto por esprimado de pensoj estas tio, kio estas matematiko por praktika meĥaniko. Reguloj de ĝia gramatiko egalas al aksiomoj de Eŭklideso en geometrio...

K. Ostanieviĉ.



Al la demando pri la traduko de la Vorto Dia en lingvo internacia.

La demando pri la traduko de Sankta Skribaĵo en lingvo Esperanto estas jam multfoje priparolita sur folioj de la "L. I." kaj oni devas nur bedaŭri, ke la diversopinieco prokrastigas la bonan finigon de tiu laboro, kies grandega signifo, mi kredas, estas sendisputebla.

Sed antaŭ ĉio oni devas rememori, ke la disputoj, eĉ la plej seriozaj kaj argumentitaj, ankoraŭ nenian aferon altiris ĝis la fino.

Ni laboru kaj esperu, t. e. ĉiu el ni devas alporti sian lepton, aŭ ŝtoneton, en tiu grandega laboro kaj kredi, ke Dio helpas al ni, ke la traduko estos finita, kaj oni trovos rimedojn eldoni ĝin.

*) En efektiveco simila dialekto en Rusujo ekzistas. Pri multaj rusoj, parolantaj france, oni diras, ke ilia *pura franca* lingvo estas dialekto francuzsko-nijegorodskoje (de urbo Nijni-Novgorod, kien kolektiĝas multaj popoloj aziaj).

De mia parto mi prezentas nun la tradukon de 10 ordonoj Diaj donitaj al Mozeso sur la monto Sinajo kaj la tezoj de feliĉeco donitaj de J. K. dum lia monta prediko. La traduko estas farita el la lingvo antikva-slava de rusa eklezio kaj tial estas diferenca de la traduko donita en la "Preĝareto".

Tomsk. Decembro 1898.

V. Shmurlo.

10 Ordonoj Diaj

donitaj al Mozeso kaj lia popolo sur la monto Sinajo en 1496-a jaro a. n. K.

Esperantigis V. Shmurlo.

1. Mi estas sola Dio via kaj neniam dioj estu por vi krom mi.
2. Faru al si nek idolon, nek ian similaĵon de io troviĝanta en la ĉiel-supro, sur la ternivelo, en la malprofundo; ne salutu ilin kaj ne servu al ili.
3. Ne ripetu vane la nomon de Jehovo.
4. Ĉiam rememoru la tagon de sabato por sanktigi ĝin; dum ses tagoj faru ĉiujn aferojn viajn; sed la sepan tagon, Sabaton, dediĉadu al Dio via.
5. Estimegu la gepatrojn viajn por ke vi estu feliĉa kaj daŭrvivema sur la tero.
6. Ne mortigu.
7. Ne adultu.
8. Ne ŝtelu.
9. Ne donu por via amiko malveran ateston.
10. Ekdeziru nek edzinon de intimulo via, ekdeziru nek domon de proksimulo via, nek kampon lian, nek sklavon, nek sklavinon, nek bovon, nek azenon, nenian beston lian kaj nenion, kio apartenas al proksimulo via.

10 tezoj de la feliĉeco

el la monta prediko de J. K. (Mateo, V: 3—12).

1. Feliĉegaj estas l' animmizeruloj: ilia estas la Regno Ĉiela.
2. Feliĉegaj estas la plorantoj: ili estos konsolitaj.
3. Feliĉegaj estas la kvietaj: ili heredos la teron.
4. Feliĉegaj estas l' avidantaj kaj soifantaj la veron: ili estos satigitaj.
5. Feliĉegaj estas la kompatemaj: ili estos pardonitaj.
6. Feliĉegaj estas la puraj de koro: ili ekvidos Dion.
7. Feliĉegaj estas la pacemuloj: ili estos nomitaj diidoj.
8. Feliĉegaj estas la elpelitaj pro la vero: ilia estos la Regno Ĉiela.
9. Feliĉegaj estas vi, kiam oni mallaŭdos kaj pelos kaj ĉiel malprave malhonorigos vin pro Mi. Ĝoju kaj gaju: grandega estas via rekompenco en la ĉielo; tiel estis pelataj la profetoj antaŭ vi.




La bezono de unu nova Mecenato.

La esperantistaro aŭ pli bone, mi diros, la homaro bezonas unu riĉulon, unu grandegan Mecenaton, unu novan savantulon. Kiu estos tiu savantulo? Ĉu inter la homaro estas naskita tia homo? Ĉu, ho, la homaro ĝis nun ne naskis tian oferanton? Se ĝi ĝis nun ne havas tian bondeziranton, ĝi postulas kaj povas lin naski. Nun estas oportuna okazo ke unu Mecenato glorigu sian nomon en la tutmonda historio.

Niaj karaj amikoj, niaj legantoj, povas prezenti al si, kian utilecon aparte por la esperantistaro kaj entute por la homaro farus unu esperanta Mecenato. Unu dediĉita al la lingvo internacia riĉulo en nuna tempo kreus al si konfeson kaj senmezuran gloron de tuta mondo. Laŭ mia opinio, estos dua savanto de la homaro tiu homo, kiu malfermos la unuan lernejon, unuan universitaton esperantan. Prezentu al vi, karaj legantoj, unu universitaton aŭ gimnazion kaj en ĝi oni aŭskultas lecionojn en la lingvo esperanta. En tia lernejo, mi kredas, kolektus sin multaj lernantoj de la tuta mondo, ĉar por ili estos tre facile kompreni la lecionojn en la lingvo universala. Tiam nia amata lingvo esperanta rapide fariĝus oficiala. En la mondo oni havas multajn homojn riĉulajn. Ĉu almenaŭ unu el ili trovos la gloron, kiu lin atendas? La disvastigado de nia lingvo universala volas unu bonan oferanton, kaj mi kredas, ke la tempo alportos lin; sed tiu ĉi tempo volas nune de la esperantistoj grandan konstantecon kaj decidecon.

25/XI—7/XII 1898 jaro, urbo *Balĉik*, apud Nigra maro, Bulgarjo.

Harion Rajĉef.



La Nova Jaro.

Feliĉa estu Jaro Nova
Por ĉiuj ni, amikoj karaj!
Kaj venu ĝi al ĉiu koro
Kun ĝiaj ĝojoj malavaraj!

Espero sankta nin vigligu
En nia paca batalar',
Ke baldaŭ pli efektivegu
La belan sonĝon de l' homar'.

Kaj amo sankta nin kunigu
En nia glora la afer'
Kaj kiel fratojn kolektigu
Sub sankta signo de l' Esper'.

Feliĉa estu Jaro Nova
Por ĉiuj ni, amikoj karaj!
Kaj venu ĝi al ĉiu koro
Kun ĝiaj ĝojoj malavaraj!

K. Boguŝeviĉ.



Universala sistemo de mono.

En la sveda gazeto "*Hallandsposten*" mi hieraŭ legis jenan artikolon:

"La universala sistemo de mono' nomiĝas malgranda publikigaĵo, kiun sinjoro Em. Hvalgren antaŭ nelonge eldonis.

La aŭtoro en ĝi rekomendas la enkondukon de unu mona sistemo internacia, unu tutmonda mono kun duobla monfundamento, ora kaj arĝenta.

La tutmonda mono estus nomata, la oraj moneroj: *chrysogram* (el la greka vorto *hrysos* = oro) mallongigate *chrys*, kiu estus partigita en *decichrys*, *centichrys*, *millichrys* kaj *decimillichrys*; kaj la arĝentaj moneroj: *argentigram* (el la latina vorto *argentum* = arĝento) kun siaj partoj *deciargents*, *centiargents* ktp.

Tamen por ne ricevi sennecese tro multajn specojn da moneroj kaj nomoj, estus uzataj nur *chrysogram* kaj *centichrys*, aŭ *chrys* kaj *cent*, kun duona kaj kvarona *cent*.

Sinjoro Hvalgren tiel volas tutmondan monan konvencion konforme je la ekzistanta jam universala ligo poŝta.

La ideo estas grandega kaj bela. Sed kiam ĝi povos efektiviĝi?"

Mi kredas, ke estus bone, se la esperantistoj volus en nia gazeto interŝanĝi pensojn pri tiu ĉi afero. Mi promesas transsendi al "*Hallandsposten*"

kaj aliaj lokaj gazetoj tradukon el tiaj interŝanĝoj de pensoj kun sciigo pri ĝia fonto.

Köinge, Svedujo, 29. XI. 1898.

Nath. Kyhler.

El Ŝevĉenko *).

Pasadas la tagoj, la noktoj pasadas;
Somero finiĝas. La flava folio
Bruetas. Okuloj jam estingiĝadas.
Ekdormis la pensoj; kor' dormas. Kaj ĉio
Ekdormis. Kaj mi jam ne scias, ne vidas:
Ĉu vivas mi? vivo al fino ĉu venas?
Ĉu tiel nur, vane, en mondo mi trenas.
Ĉar mi jam ne ploras, ne ridas...

Sort' mia! kie vi estas?

Kie? Ekzistas nenia!

Di! se ne donas la bonon —

Estu malbona la mia!

Ho, mia Di! mi ne volas

Dormi, kaj dormi starante;

Treni en mond' mi ne volas

Kiel hakajo, putrante; —

Faru, ke plene mi vivus,
Laŭdus, ho Di', vian nomon,
Faru, ke varme mi amus
Mondon belegan kaj homon!
Estas timebla — la morton
Trove en la mallibero;
Sed pli malbona ĝi estos:
Dormi, havante liberon,
Kaj por l' eterno ekdormi,
Lasi nenion en mondo
Kaj por l' etern' — forgesita
Esti en tomba profundo.

Sort' mia! Kie vi estas?

Kie? ekzistas nenia.

Di! se ne donas la bonan —

Estu malbona la mia!

S. Sviridov.

El Nova Kaledonio.

II.

Pri la Kanakoj.

Kiam la ŝipestro de la militŝipo "Le Phoque", la kontr'admiralo Febvrier-Despointes alvenis la bordojn de l' insulo de l' Nova Kaledonio, ĉe la loko nomata Balade, kaj ke li posedigis la landon je nomo de la Franca Imperiestro Napoleon III, en la jaro 1853, kaj la 24:a tago de Septembro, li trovis multajn landanojn sovaĝajn, kaj eĉ antropofagajn, kiuj disestis, dividitaj en multaj triboj kaj vilaĝoj, inter la tuta insulo.

Oni ne povas certigi la veran devenon de la Kanakoj nune loĝantaj en nia kolonio. Kelkaj etnologistoj skribis ke ili estas el gentoj aziaj; aliaj kredas ke ili venis el Ameriko. Nelongetempe ni legis ke kelkaj similaĵoj ekzistas inter la kanakoj kaj aliaj afrikaj gentoj, precipe kun la Konga landulo.

La Respektinda Pastro mortinta, Montrouzier, kiu vivis en Kaledonio je 1853, ĉiam jesigis ke la deveno de la kanakoj estas certe azia, ĉar ili havas multajn similajn uzojn kiel aziaj gentoj.

Ni pensas ke la demando ne estas mallonge; kaj neniam estos solvebla.

Se la unuaj landuloj de la oceania insulo — kiel la aliaj insulanoj de tiu ĉi parto de l' mondo — havus sian propran skribajon, kaj solan lingvon, eble, ĝi estus certe ke la deveno vera konatigus al ni — per la transmeto de la malnovaj skribitoj. Sed, nenia literaturo ekzistas inter la kanakoj, kaj

*) Ŝevĉenko. glora malgrandrusa poeto, naskita en 1814 jaro, mortinta en 1861.

ni restos ĉiam nekonantaj ilian devenon: La maljunuloj rakontas al la junuloj la antikvajn agojn, ĉefajn farojn de ilia epoko, kaj tio estas tute la historio de la popolo kanaka.

Mi devas postdiri ke, sur la bordoj de l' insulo, estas granda diverseco inter la kanakoj; kelkaj ŝajnas posedi ostajon kiel hina gento; aliaj memorigas per kelkaj apartaĵoj la francan aŭ anglan genton. Tio ĉi estas komprenebla, ĉar la triboj de la bordo mara ofte komercigis kun la plej diversaj naciaĵoj — komercistoj aŭ maristoj.

Ĥinoj ofte alvenis Novan Kaledonion por trovi kaj enporti Sandalon, rozkoloran lignon, kaj, precipe la marajn kukumojn — kiel nomas la maristoj — kiujn ĥinoj multe amas.

Antropologie, la kanakoj estas entute grandaj, ilia koloro estas nigra-bruna, preskaŭ kiel ĉokolado. Kelkaj el la sudaj triboj estas kupraj. La frunto iras ekstere, la vangoj iom pendantaj, la nazo platuma, la lipoj dikaj sed ne falantaj kiel tiuj de la nigraj gentoj.

Oreloj estas grandaj ankaŭ, kaj senformiĝantaj per la uza boranto de sia malsupra parto kun granda kavo. Tio ĉi iĝas kiam li estas knabo je tri aŭ kvar jaroj. Oni ekfendas la malsupran randon de l' orelo kun glasaĵa peco; kaj oni pligrandigas iom post iom kun lignajaj pecetoj, poste kun volvataj folioj de palmarbo.

La insulanoj de Loyalty — insularo proksima de Nova Kaledonio, — ne senformigas la orelojn kiel kaledonianoj: ili boras kaveton kaj enmetas oran ringon kiel eŭropanoj.

La okuloj de la kanakoj estas grandaj kaj ili havas la blankan parton de la okulo ĉe ni, iom flavan.

La dentoj estas belaj, bone enmetataj kaj tre blankaj.

Preskaŭ ĉiuj havas longajn lanojn sur la brusto kaj sur la ŝultroj; kelkaj lasas la barbon tute kreskantan aŭ nur kiel linio de la oreloj ĝis la lipharoj. Ili sin razas kun glasa peceto de botelo.

La haroj estas longaj kaj lanajaj. Ni diros en kia cirkonstanco ili pli-longigas la harojn — ĝi estas funebra signo.

Se la viro estas — je 40 jaroj — ankoraŭ forta kaj sanega, ni ne povas diri same pri la virino: ŝi ne havas trajtojn longetempem maldikajn, ĉar ŝi multlaboradas kaj per tio ŝi maljuniĝas antaŭe la viro. Ŝiaj mamoj moliĝas rapide kaj pendigas kiam ŝi estas ankoraŭ juna. La figuro ŝajnas baldaŭ kiel besto.

Estas malsimileco inter la triboj de la bordo mara kaj tiuj kiuj loĝadas en la internaĵo de la insulo.

Marbordanoj estas pli inteligentaj ĉar ili komercigas kun la blankuloj, vendas *kopran* (nuksoj de palmo sekitaĵoj por la fabriko de oleo); kun la mono de ilia komerco ili aĉetas alkoholon kaj pafilojn (kaŝiĝe), kiujn ili revendas al la internaj triboj.

La vendo de la pafiloj estas nun pli malfacila, ĉar la loka reganto estas tre severa tiom por la vendistoj kiom por la aĉetantoj. Tamen li donas permeson al kelkaj kanakoj pafilojn posedi por la ĉaso, sed tiu ĉi permeso estas donata tre malofte kaj bone sciiĝante.

Liberaj punitoj, kiuj deviĝas loĝadi en la kolonio, estis longatempem la vendistoj de pafiloj kaj alkoholo. Ju pli severe la reganto punados la kulpojn, des malpli la kanakoj havos pafilojn kaj alkoholon.

Ni kredas ke la bordaj triboj estos ĉiam pli civilizataj ol la aliaj, ĉar, eble, bordoj estos ĉiam pli popoliĝataj ol la interna insulo. Se la kolonio popoliĝos pli kaj pli en la interna parto de la insulo, kanakoj de tiu ĉi parto estos malpli sovaĝaj per la kunaĵo de l' eŭropanoj... nur se kanakoj malpopoliĝus!

Ni ne povas tro diri pri la moroj de la kanakoj: ĉar iliaj moroj ne estas tre puraj; poligamio ne tiom ekzistas kiom ĝi estis antaŭ ol la pastroj katolikaj kaj aliaj alvenis, sed la tribestroj — kelkaj de la norda parto — posedas ankoraŭ kelkajn virinojn. La nombro da virinoj estas pli granda ol da viroj.

La kanakoj malpopoliĝos, ĉar ili drinkas alkoholon, ili fumas multege tabakon fortegan — virinoj ankaŭ; — kaj ili ne zorgas la sanecon.

Ili ne povus loĝadi longetempe en la sama loko: ili amas vojaĝadi. La publikaj oficejoj kaj landanoj ilin uzas kiel servantojn, kiel maristojn, kaj eĉ kiel policistoj, sed ili ne restas pli ol unu jaron — kaj ili revenas en la triboj kun la mono ŝpara. Ĉar ili amas monon — kaj la deksuojn kaj dolaron (ili nomas tiel la francan moneron da 5 frankoj) posedi havas grandan plezuron. Sed, iom post iom — la amuza mono ŝanĝas je poŝo kaj fariĝas alkoholo....

Ili estas ordinare tre mastremaj: Sen okupada kolego — sama tribano — venas loĝi kun la alia kaj li scias ke li havos nutraĵon kaj ankaŭ trinkaĵon, senpage. La ricevinto konas ke alifoje estos li ricevota.

Kanakuloj estas, certe, grandaj infanoj: maldrinkataj ili ĉiam ludas kaj ĝojas; sed ili fariĝas sovaĝaj kaj kiel bestoj kiam ili estas drinkataj. La malameco je la blankaj homoj vidiĝas, kaj ĝi estas danĝero lin eksciti.

Nune malnovaj kutimoj ne plu ekzistas. Kelkaj estis tre interesaj, sed multaj estas forgesitaj. Ni rakontos — antaŭe ke oni ne plu konis — la funebran ceremonion por granda estro. Ni devas diri ke, nune, ĝi estas same ke por la eŭropanoj.

Kiam granda estro mortiĝis, ĉiuj kanakoj kunaliĝis por lin ploradi: la virinoj kune ploris — kaj la ploraĵoj devis ĉesi kaj rekomenci, ĉiam kune.

Kiam la korpo de la mortinto estis sufiĉe vidita je la tribanoj, ĝi estis metita sur branĉa metilo kaj alportita la lokon de enterigo. Ĝi estis ombraĵa loko per la *baniano* (arbo) sub kiu ripozas la parencoj de l' estro. Sur la branĉoj pendis ŝtofoj je multkoloraj, plektaj herboj. Ne malproksime je tie estas plantata *tabu* — kiu estas granda lignaĵa figuro — ornamata je diversaj ŝtofoj. Al la malsupro de tiu ĉi dieco malkristana, la kanakoj alportis siajn donacojn kiuj konsistis je fiŝoj fumitaj, kolomboj kaj aliaj nutraĵoj.

Kiam la aro estis venanta proksime al la loko de enterigo — ĝi haltis. Sur la korpo oni disjetis polvon fumajan kaj oni ĝin metis sur liton foliaĵan de palnuksarbo.

Poste frato aŭ alia parenco de l' mortinto, suriranta sur konstruaĵon kun piuloj, elparolis longan paroladon pri la mortinto, pri liaj ecoj.

Ni devas rimarkigi ke kanakoj amegas paroladi — sed ili, ofte, diras denove la saman paroladon.

Virinoj — kiam la parolado finiĝis — ploradis ankoraŭ kaj ĉiuj eliris.

Dum kelkaj monatoj — du aŭ tri — unu viro gardis la mortintan korpon, kaj ricevis la nutraĵon alportitan — sed ne tro proksime de la loko enteriga, ĉar la kanakoj timegas la *tabu*...

Kiam la kanakaro revenis la vilaĝon, ĝi, nokte, havis dancojn — nomatajn ankaŭ nune *pilu-pilu*.

La parencoj de la mortinto brulis sian domon kaj ree konstruis novan. Konstruaĵo kanaka estas foliaĵa kaj herbaĵa — kun ĉarpento ligna.

Kiam kanako perdis sian patron, li lasas kreskadi la harojn — dum tri jaroj — aŭ pli bone tri *ignamoj*... kaj ilin volvigas je ŝtofoj blujaj, blankaj kaj ruĝaj: iom post iom la piramido grandiĝas. Kiam lia funebro finiĝis, la tribo ariĝas kaj oni tranĉas liajn harojn, kaj la rea *pilu-pilu* rekomencas kiel festo.

La kanako estas tre fiera: kiam oni parolas pri niaj artoj, nia industrio, li ŝajnas ne konvinkata. La *ni-ni* (kiel li nomas la blankajn homojn) havas siajn morojn kaj artojn, sed ni havas la niajn... Ni devas konfesi ke ili estas malmultaj kaj malmulte originalaj... precipe nune...

Ne pensu ke la kanako estas dankema por tio kion vi faris por li! Ne! Oni vidis, daŭrante la ribelo de 1878, kanakojn vunditajn kaj flegitajn de la kuracistoj aŭ de la pastroj, kiuj prenis la sagpafilojn (bataliloj de la sovaĝa gento) kaj kiuj provis mortigi tiujn kiuj volis dolĉigi iliajn suferojn.

Li estas ankaŭ mensogema, kaj vi povas neniam scii tion kion li pensas. Li parolados longatempe, jesigos, neigos, kaj, fine, tra multaj kaj diversaj diritoj, vi ne povas konatiĝi la veron.

Li estas postulema kiel infanoj; li amas demandi. Se li vin renkontas, li sin demandas kien vi iras? Por kio vi iras tien? Kiun vi vidos? k. t. c. Vi pensus ke li volus konatiĝi tion kion li vidas — kiel telegrafojn, pafilojn. Ne: li akceptas ke ĉiuj aĵoj de la blanka gento estas ekster lia kompreniĝo — kaj ĝi estas sufiĉe por li!

Ĝis nune vi pensos ke la kanakaj ecoj estas tre malmultaj. Ni devas konfesi tamen ke li estas brava, tre kuraĝa por la batalado, ke li ne timas la morton, kaj ke li ne havas la saman teruran ideon kiam ni, civilizitaj homoj, havas. Li diras: morto estas la vespero de unu tago!

Lia numerajo ne estas tre multa: La fingroj de la mano donas al li la nombrojn de 1 ĝis 5: Li kalkulas poste 2 fojoj 5; 3 fojoj 5; 4 fojoj 5... kaj li diras... multe, multege. Kun 4 fojoj 5 li formas novan unuecon, kiu estas: *Viro* — ĝi reprezentas la 5 fingrojn de la manoj kaj de la piedoj — 2 viroj egalas 40.

Por la kalkulo de la tempo, li uzas la sunon por unu tago — la lunon por unu monato — kaj la *ignamon* (radika kreskaĵo kiu estas lia ĉefa nutraĵo) por unu jaro.

Ni ne volas tro enui la legantojn de la L. I. kaj ni finos tiun ĉi artikolon parolante pri la virina situacio ĉe la kanakoj. Ĝi ne estas tro dezirinda —, kiel vi povus ĝin juĝi.

La viro — *tajo* — estas ĉio. La virino — *popine* — estas nenio! Ni ne povas esprimi plej bone la veron. Kiam la sinjoro kaj mastro ripozas sub la ombro de la palmarbo, la malfeliĉa kanakino iras serĉi akvon ĉe la rivereto, aŭ alporti la lignon por bruligi: ili uzas multe da ligno, ĉar la fajro ĉiam bruladas en la domo.

Se la familio iras al festoj — *pilu-pilu* —, la kanako marŝas antaŭe sen portante ion. Sed la kanakino, kiu marŝas malantaŭe, portas sur sia dorso la foliaĵan je palmarbo korbon, plenitan de ŝtofoj, nutraĵo k. t. c., kaj kelkfoje ŝi portas, ankaŭ, la knabeton.

Li fiŝkaptas — fumas tabakon, kaj ripozas. Ŝi laboradas, ĉiam, kaj ĉiam.

Tial la viro de kvardek jaroj estas forta, fortika, dum la virino de tridek jaroj estas maljuna virino: Por ŝia edzo, ŝi estas besto, almenaŭ servantino.

Ni ofte renkontis — malproksime venantan sur la vojo — familion kanakan, kaj ni rimarkis — kiel ĉiuj — ke la virino lasas la vojton, kiam ŝi vidas fremdulon, kaj ke ŝi sin jetas ekstere kaj kaŝiĝas, ĝis la fremdulo elpasis.

Por konkludi tiun ĉi tro longan artikolon, ni devas konfesi ke la kanakoj ne estas tre utilaj je la kolonioj. Ĉar ili ne volas labori — iafoje ili helpas la blankulojn por fari konstruaĵojn; ili vendas fiŝojn, sed ili ne laboras longatempe kaj oni deviĝis varbadi la laborantojn ĉe la eksteraj insuloj — por la kafuja laboro k. t. c. . . . La loka reganto donis al ĉiu tribo sufiĉan landon por ĝiaj bezonoj — tio kontentigas ilin. Eble la kanakoj estas la veraj saĝuloj kaj ni . . . la malsaĝuloj kun ĉiuj niaj bezonoj ĉiam kreskantaj!

Numea, Nova Kaledonio. Decembro 1898.

E. Bardoulet.

Ŝtelistaĵo.

Tradukis D-ro Ebner.

La printempsuno disvastigis siajn radiojn varme kaj mole tra la vasta lando kaj la granda urbo kun ĝia ondanta agado kaj bruoj.

La krucoj oraj kaj butonoj de la turoj kaj de la kasteloj lumas kiel steloj brilantaj.

En la stratoj larĝaj kaj grandaj placoj la multego da homoj premiĝas kaj belaj veturiloj kun ĉevaloj kuraĝaj rapidas tien kaj ien.

Sed ne tutaj stratoj de la granda urbo estas konstruitaj larĝe kaj ornamite.

Pli malproksime je la antaŭurboj la domoj fariĝas malpuraj kaj malbelaj; ĉevaloj malsatitaj kaj lacaj tiras pezegajn veturilojn ŝarĝitajn per disjetajoj kaj ĉifonajoj.

Lace kaj malrapide rampas la homoj laŭlonge la muroj malgajaj kaj mallumaj.

La suno lumigas ilian vojton malgajan, la domojn maljunajn, makulitajn, — ĝi ŝajnas je ilia vizaĝo pala. Sed en iliaj trajtoj lacaj, velkaj loĝas la nokto, la nokto de iliaj loĝejoj malaeraj kaj kavernoj, la nokto de la mizerigo kaj de la zorgo.

El iliaj okuloj estingitaj, el la okuloj kun la ŝajno malcerta, avidema vidas la malsato.

Ĝi estus pli bone: neniam la suno estus leviĝinta sur tiuj ĉi stratoj kaj mallumajo eterna kovrus ilin per forgeso eterna, ĉar nokto kaj malsato konstruis tie ĉi sian tronon kaj la suno mem ne povas dispeli ilin.

“Mi efektive ne povas ĝin fari malpli multekoste; vidu do, ĝi estas ligno firma, ĝi havas bonan sonon.”

Viro kun granda ĉapelo kaj verda antaŭtuko, kiel meblofaristoj ĝin portas ordinare dum la laboro, diris tiujn ĉi vortojn. Li staris meze en ĉambreto malriĉa kaj malplena, per kies fenestro malgranda nur malfacile penetris lumo griza de l' tago; tra la fenestro oni vidis korton ĉirkaŭitan per altaj, grizaj muroj.

“Mi efektive ĝin ne povas fari malpli multekoste!” Tiujn ĉi vortojn dirante li frapis en ĉerko kunnajlita per traboj krudaj, kiu staris antaŭ li en la planko.

Apud la ĉerko genuis viro ŝajne ankoraŭ juna, vestita en bruna laborvesto, kaj estis metinta la kapon en ambaŭ manoj. — Nun li subite vekigis el siaj songoj kaj transvidis je la fenestro.

Malgranda knabino en aĝo de 4 ĝis 5 jaroj kun vizago palega sidis antaŭ la fenestro kaj avide mordetis ŝelon de pano. Ŝia frato pli malgranda ludis en la planko kun granda najlo rusta.

Sopira plendo leviĝis el la brusto de la viro genuanta. “Atendu ankoraŭ unu tagon“, li petis kun voĉo seka, “la infanoj havas nenion da manĝaĵo, ĝi estas mia lasta mono. Mi ne povis ŝin forlasi, la Marinjon, en la lastaj tagoj, ĉar ŝi jam ne povis moviĝi; tial mi estas forpelita el la fabriko.“

“Mi korege vin bedaŭras“, respondis la viro kun la ĉapelo en kompata, sed difinita sono. “Mi mem havas nenion superfluan kaj devas havi la mian.“

La vivo en la laborvesto leviĝis, iris kun piedoj malcertaj tra la ĉambreto je la lito, reŝovis la litotukon malordinare surjetitan kaj serĉis per la manoj en la pajlo de la lito. Tiam li eltiris monujon malgrandan kaj skrapitan, kies enhavon li skuis en la kavo de l' mano.

“Sed l' infanoj, l' infanoj“, li murmuretis mallaŭte kaj vidis malespere tra la fenestro. Li viŝis per la maniko de sia frunto la fluantan ŝviton kaj vidis ree kaj ree la monareton en sia mano, tiam li ĝin lasis fali tinte en la tablo, reiris malrapide al la ĉerko kaj dronis en siaj songoj malgajaj.

Li ne vidis, kiel la viro kun la ĉapelo granda preninte la monon eliris el la pordo, li ne rimarkis, ke lia malgranda filino proksimege aliris al li, kaj li levis la kapon klinitan ne pli frue, ol kiam la manetoj malgrandaj, velkaj atingis lin.

La infano staris antaŭ li, pala, kiel fantomo, kun la malgranda, maljuna visaĝo. La okuloj plentimaj, demandantaj distondis al li la koron. “Kiel longe ankoraŭ dormos la patrino?“ demandis la malgrandulino. “Mi havas tiel grandan malsaton; patro, donu vi manĝi al mi, mi petas, donu al mi manĝi.“ La infano alpremiĝis firme al la viro, kaŝis la kapeton en la faldoj de lia vesto kaj elploregis maldolĉe kaj malgaje.

La viro viŝis per la mano la okulojn kaj la frunton brulantan, kisis sian filinon kaj leviĝis tiam rapide. En liaj trajtoj estis io spita, esperanta, kiel ĉe iu, kiu post longa dubo penetris al decido difinita.

“Estu nur bele pacienca kaj zorgu por la Haĉjo“, li diris plename ĉirkaŭprenante la malgrandulinon per la brakoj, “baldaŭ mi estos ree tie ĉi kaj alportos ion belan al vi, al vi kaj al malgranda Haĉjo.“

Li rapidis el la pordo sur la korto, tra la longa, malluma pordego kaj laŭlonge la strato longa, izolita.

* * *

Post la grandaj spegulvitroj de restoracio riĉege ornamita sidis du sinjoroj kaj rigardis enuitaj la homojn preterirantajn.

“Vi estas ja farinta hieraŭ ree kaptajon grandan, verege, feliĉo diabla“, diris la pli juna de la ambaŭ sinjoroj, ĵetante rigardon admirantan je sia *vis-à-vis*.

Tiu ĉi *vis-à-vis* strekis la lipharojn metitajn per barbĉmiraĵo en situacio tiel malnatura, kia eble ankoraŭ pli alten je la okuloj, blovis grandan fumrington el sia habanacigaro en la aero, kaj sekvis tiun ĉi plensignife per la okuloj.

“Oni diras“, komencis denove la sinjoro pli juna “ke via kunludinto devas esti sufiĉe **“preta.”** Li kredeble devos migri transen; sed eble la patro tamen ĝin povas ankoraŭ pagi.“

“Esperu ni ĝin por li“, respondis la sinjoro kun la kuraĝaj lipharopintoj kaj batis per la fingroj ringornamitaj polvereton de sia maniko, “esperu ni ĝin por li! Ĝi estas kompreneble honorŝuldoj, kaj mi farus lin tute maleblan en la societo. Cetere mi mem ankaŭ miris, ke mi sukcesis lin altiri; plifruo li atingis neniam karton.“

Subite oni aŭdis en la strato interaliaparolado da multaj voĉoj kaj proksimiĝis amaso da homoj.

La ambaŭ sinjoroj estis leviĝintaj por vidi pli bone; laboristo en bruna laborvesto estis kondukata per du policistoj. Novsciemuloj, maldiligentuloj kaj stratknaboj kuris poste.

“Kio nun estas farita?“ demandis la pli juna sinjoro la kelneron, kiu estis parolinta en la strato kun policisto.

“Nenio rimarkinda“, respondis tiu ĉi kun movado malestima de l' ŝultroj; “la viro petegis almozon ĉe la bakisto, kaj, kiam oni lin forpelis de la sojlo, li provis kun peco da pano forkuri. Sed tamen ili kaptis lin.“

“Ĝi fariĝas ĉiam malmodeste, tiu ĉi ŝtelistaĵo! Nun jam en hellumega tago!“ parolis ĉagrene la sinjoro kun la lipharoj kuraĝaj — “espereble li estos farata, je kelka tempo, sendanĝera por la homa societo. Jen pro tiu ĉi sentaŭgulo al mi leviĝinte mia cigaro estas subfalinta planken.“



La Patro.

Rakonto de **Bjoernstjerne Bjoernson.**

La plej potenca homo en la paroĥo, pri kiu estos tie ĉi parolata, sin nomis Tord en Överås. Li staris iun tagon en la oficejo de la pastro, altkreska kaj serioza. “Al mi estas filo donita“, li diris, “kaj mi deziras ke li estu baptita.“ — “Kiel estos lia nomo?“ — “Finn, kiel de mia patro.“ — “Kaj la baptanoj?“ — Li ilin nomis; estis la plej eminentaj viroj kaj virinoj de lia propra parenkaro. “Ĉu estas io alia, kion Vi deziras?“ la pastro demandis, ekrigardante lin. La vilaĝano mallonge ekdubadis. “Mi volonte deziras, ke li estu baptota sole“, li respondis. — “Vi volas diri: en simpla tago?“ — “En la proksima sabato, je 12 horo.“ — “Nenion alian plu?“ la pastro demandis. — “Nenion plu.“ La vilaĝano turnigis sian ĉapon, kiel por iri for. Tiam la pastro sin levis. — “Ankoraŭ io“, li diris, aliris al Tord, prenis lian manon kaj lin rigardis en la okulojn: “Donu Dio, ke l' infano estos beno al Vi!“ —

Je dek ses jaroj post tiu tago Tord ree staris en la ĉambro de la paroĥestro. “Vi fartadas bone, Tord“, diris la pastro, ĉar li vidis nenian ŝanĝon en li. — “Mi ankaŭ neniam ĉagrenojn havas“, Tord respondis. La pastro silentadis, sed post kelka tempo demandis: “Pro kia afero Vi hodiaŭ venas?“ — “Tiun-ĉi vesperon mi venas pro mia filo, kiu morgaŭ estos konfirmata.“ — “Li estas brava junulo.“ — “Mi ne volis pagi al la pastro, antaŭ ol mi sciigis, kiun numeron li havas en la konfirmataro.“ — “Li staros kiel numero unu.“ — “Mi aŭdas, kaj jen la 10 dalerroj al la pastro.“ — “Ĉu io alia?“ diris la pastro, rigardante Tordon. — “Nenio alia.“ — Tord foriris.

Ankoraŭ ok jaroj pasiĝis, kiam iun tagon estis aŭdata bruo antaŭ la pastra ĉambro; ĉar multaj homoj eniris, Tord la unua. La paroĥestro ekrigardis kaj lin rekonis. — “Vi venas kun multaj homoj hodiaŭ.” — “Mi volas mendi la preĝejan sciigadon pri la edziĝo de mia filo; li edziĝos Karin'on en Storliden, filinon de Gudmund, kiu staras tie ĉi.” — “Ŝi ja estas la plej riĉa fraŭlino de tiu ĉi regiono.” — “Oni tiel diras”, la vilaĝano respondis, glatante supren siajn harojn per la mano. La pastro penseme sidadis dum mallonga tempo; li nenion diris sed enportis la nomojn en siajn librojn, kaj la viroj subsignis. Tord metis 3 dalerojn sur la tablon. — “Al mi ne estas pli ol unu”, diris la pastro. — “Jam mi scias; sed li estas mia sola infano, kaj mi volonte faros ĝin honeste pro li.” — La pastro akceptis la monon. “Estas la tria fojo ke Vi venadas tien ĉi pro Via filo.” — “Sed nun li estas ankaŭ preta”, respondis Tord, fermis sian monujon, diris adiaŭon kaj iris for. La viroj lin sekvis, malrapide.


Dekkvar tagojn poste, la patro kaj lia filo remadis trans la lago al Storliden por interparoli pri la edziĝo. “Tiu ĉi tabulo ne firme kuŝas sub mi”, la filo diris, levante sin por ĝin meti en ordo. Samtempe la tabulo, sur kiu li staras, forglitas de sub li; ekvingas li la brakojn, ekkrias kaj falas en la akvon. — “Ekprenu la remilon”, kriis la patro, sin levis kaj eltenis ĝin. Sed provinte du, tri fojojn, la filo tetaniĝas. — “Atendu nemulte!” ekvokis la patro kaj alremis al li. Tiam la filo falas malantaŭen, ĵetas daŭrigantan rigardon sur la patron — kaj dronas.

Tord ne povis ĝin plene kredi; li haltigis la ŝipeton kaj rigardadis la lokon, kie subiris la filo, kiel atendanta ke li revenos supren. Tie kelkaj vezikoj ekmontriĝis, ankoraŭ kelkaj, laste unu sola, granda, kiu ekkrevis — kaj ree spegulante hela kuŝadis la lago.

Dum tri tagoj kaj tri noktoj oni lin vidis remadi ĉirkaŭ la loko sen doni al si la tempon por manĝi aŭ dormi; li serĉis sian filon. En la mateno de la tria tago li lin trovis, kaj, kun la filo sur sia dorso, li iris trans la montetoj en sian hejmon.

Pasiĝis post tiu tago proksimume unu jaro. Tiam, malfruan aŭtunan vesperon, la paroĥestro aŭdis, ke iu moviĝas en la vestiblo kaj mallaŭte serĉetas la ŝlosilon. La pastro malfermis la pordon; eniris altkreskulo, maldika, kun blankaj haroj. La pastro lin longtempe rigardadis antaŭ ol li rekonis lin; estis Tord. “Kiel malfrue Vi venas?” diris la pastro, staranta sen movo antaŭ li. “Jes, mi venas malfrue”, diris Tord kaj sidiĝis. La pastro ankaŭ sidiĝis, atendeme; estis longtempa silento. Diris fine Tord: “Mi ion alportas, kion mi volonte donus al la malriĉuloj.” Li sin levis, metis monon sur tablo kaj ree sidiĝis. La pastro kalkulis ĝin. — “Estas multe da mono”, li diris. — “La duono de mia bieno, hodiaŭ vendita.” La pastro penseme sidadis; fine li dolĉe demandis: “Kion Vi pensas nun fari, Tord?” — “Ion pli bonan.” — Tiel ili tie sidadis dum kelka tempo, Tord firme rigardante la plankon, la pastro rigardante lin. Fine, mallaŭte kaj nerapide, la pastro diris: “Nun mi kredas, ke fine la filo Via fariĝis beno al Vi.” — “Jes, nun mi mem tiel kredas ankaŭ”, diris Tord; li ekrigardis renkonte, kaj du grandaj larmoj malrapide kuris trans lia vizaĝo.


Tradukis el norvega lingvo H—g.



Pri la “knallar“, kiuj volis provi la pafilon.

Unufoje envenis sep “knallar“*) en dometon, kie pafilo pendis sur la muro. “Kiom kostas la pafilo?“ ili demandis. “Sep kronojn“, respondis la viro. Ili elprenis kaj donis al li po sep kronoj. Poste ili volis provi ĝin. Tiam ili enmetis pulvon, ĉiu po unu pafilo, kaj enŝtopis ĉiu po unu antaŭŝtopaĵo. Poste, kiam ili volis ekfajri la pafilon, ili ĉiuj devis teni la pafilon. En la momento kiam la pafilo ektondris, la pafilo ekpuŝis tiel ke la tuta anaro falis sur la tero. Tiam ili diris: “Tio ĉi estas bonega pafilo! Ĝi prenis tiom posten, kiom ĝi devus do preni antaŭen.“ Post tio ili eniris en la dometon kaj donis al la viro po unu krono plu.

Tradukis P. N.



Koro de patrino.

(El rusa.)

Ekamis junulo fraŭlinon. Ŝi estis tre bela, sed vanta kaj senkora. Unufoje ŝi songis, ke ŝi restos ĉiam bela kaj juna, kaj eĉ fariĝos pli bela, kiam ŝi gardos ĉe sia koro la koron de tiu virino, kiu naskis ŝian amatulon. Kaj diris la fraŭlino al la junulo:

“Iru, mortigu vian patrinon, elprenu la koron de la brusto kaj alportu ĝin al mi!“

Kun teruro li ekrigardis ŝin kaj forkuris malproksime, malproksime.

Sed en la sekvanta tago li revenis al la amata fraŭlino kaj ŝi diris al li ree:

“Iru, mortigu vian patrinon, elprenu la koron de la brusto kaj alportu ĝin al mi por ke mi povu vin ami eterne kaj por ke mi estu eterne bela kaj juna!“

“Ah! ne postulu de mi tian teruran agon“ — ekkriis la junulo.

Sed ŝi komencis lin kisi kaj murmuretis al li:

“Faru tion ĉi! Faru! Montru al mi ke vi min amas!...“

Kaj ree li forkuris de ŝi kaj kuris kien liaj okuloj rigardis.

En la dua tago li revenis al ŝi, kaj ree ŝi komencis paroli al li tion saman:

“Iru do, mortigu vian patrinon, elprenu ŝian koron kaj tiam mi vin eterne amos kaj tiam mi restos ĉiam bela kaj juna kaj feliĉa!“

“Oh, ĉesu!“ — petegis ŝin la junulo.

“Se tiel, se vi ne volas, mi ekamos alian, kaj tiu faros tion ĉi pro mi“ — diris la fraŭlino kaj deiris de la junulo.


En malsaĝa malespero li vagis tutan tagon en la kampoj; kiam fariĝis mallume, li kuris hejmen kaj faris ĉion, kion postulis de li la ekamata...

Kaj kiam li, tremante je la tuta korpo, kuris en nokta mallumo al sia amata, tenante la koron de l' patrino en la manoj, li subite falis kaj sin kontuzis.

Kaj en tiu momento, kiam li sin levadis de la tero kaj ekĝemis pro la malsanaĵo, la tremeganta koro de l' patrino ekparolis kaj diris per delikata voĉo:

— Vi vin kontuzis, kara filo? Kie vi sentas la malsanaĵon, mia aminda?

Greguar Slucki.



*) “Knalle” (multnombro: “knallar“) estas moka nomo, kiun la vilaĝanoj uzas pri migrantaj komercistoj el la provinco *Vestergötland* en Svedujo.

De niaj abonantoj.

Gramatikaĵo.

Nur "la plej bona" aŭ simple "plej bone", — neniam "la plej bone".

La plej bona estus, laŭ mi, neniam uzi "*la plej bone*". Kvankam nek nomo nek pronomo sin trovas en mia frazo, mi uzis adjektivon, kiu rilatas al la *ne dirita* nomo "afero". Jes, mi opinias *la plej bonan aferon* (oni povas diri ankaŭ *la plej bonan*) neniam uzi "*la plej bone*", ĉar tie ĉi la artikolo nenian rolon ludas kaj estas simple galicismo. Sekve ĝi estas tute malbezona kaj ni ĝin ne uzu en *similaj okazoj*.

Plej bone ni diru: *La plej interesa* (aŭ *plej interese*) estus vidi lin tie. *Plej bone* (aŭ *la plej bona*) estus silenti pri ili. Fortiri sin estis *la plej terura* (aŭ *plej terure*) por la suferanto.

Atomo Homara.

La esperantista signo.

S-ro H. Tacievski deziras, ke ĉiuj esperantistoj portu ŝetonojn kiel signojn de ilia adepteco de nia lingvo, kaj observigas, kian grandan signifon ne sole por reciproka ekkono inter ili, sed ankaŭ por la propagando inter neesperantistoj havus tia videbla konilo. Vidu en tiu ĉi rilato la anoncon de s-ro H. Stalberg, legatan en tiu ĉi numero.

* * *

Mi intencas konatigi rusan popolon kun moroj de alilandanoj. Rusa popolo tute ne scias ilin, sed la konateco kun alilandaj moroj estas utila kaj interesa. Tial mi havas kuraĝon turni min al ĉiuj amikoj esperantistoj, ke ili volu helpi al mi. La helpo povas esti en tio ĉi: esperantisto el ĉiu lando volu alsendi al mi priskribon de moroj: de edzigaj festenoj, fianĉiĝoj kaj enterigoj. Tiuj ĉi priskriboj mi tradukos en lingvo rusa kaj eldonos per "popola (t. e. malkara) eldono", libreto por 2, 3 kopekoj. Mi estos tre danka al ĉiuj, kiuj helpos al mi en tiu ĉi afero; mi esperas, ke amikoj esperantistoj ne rifuzos mian peton. Mia adreso: *Jalta*, Krim, Autskaja ul., d. de Kruman, al Aleksandra Bernstein.

Kun kora saluto al tuta esperantistaro.

Aleksandra Bernstein.

Propagando inter komercistoj.

La ĉefa celo de l' Esperanto estas la faciligo de l' komunikoj internaciaj. La postuloj, kiuj estos alportebaj al ĝi — la komprenebleco kaj la facileco ĝin ellerni, eĉ pli: komprenebleco preskaŭ sen bezono ellerni. Ĝi donas ĉion, kion oni postulas de ĝi. Sur vico restos l' atingecco de celo. Mi trovas unu el la plej bonaj rimedoj, samtempe donantaj la eblon ĝin vastigi, kaj prezentantaj l' atingecon de l' rezultatoj de ĝi atendataj. La rimedo estas tia: oni devas influi sur eble granda nombro de l' fabrikantoj kaj komercistoj de Eŭropo (kaj de aliaj landoj) kaj igi ilin eldoni iliajn prejskurantojn kaj reklamojn kune kun ilia patra lingvo, ankaŭ per lingvo Esperanto. Mi estas komercisto, kondukanta la komercon importan el diversaj landoj de Eŭropo kaj Ameriko; kaj mi havas bezonon utiliĝi per prejskurantoj, eldonitaj en ĉiuj lingvoj preskaŭ de l' tuta mondo. Ne malfacile estos kompreni, ke estas maleble por unu persono scii ĉiajn lingvojn: sed tiu ĉi malhelpo estas tiel granda, kaj tiel videbla, ke senutile estas pri ĝi paroli. La komerco estas unu el pli gravaj iloj de l' progreso, sed ĝi estas tre ĝenata per reciproka malkompreno de l' flankoj. Se estus eble al la mondo komerca interkompreniĝi per unu lingvo Internacia, la reciprokaj komunikoj komercaj, kaj poste ankaŭ ĉiuj aliaj estos faciligataj, kaj kune kun tio vastiĝos la lingvo Esperanto, servante samtempe kiel la rimedo kaj kiel la celo de ĉiuj amikoj de komuniĝo homara.

A. Plusnin.


* * *

Tre estimata Redakcio!

Mi kuraĝas fari ian proponon, pri kiu mi kredas, ke ĝi ne restos sen rezultato. — Tre levus la interesecon de l' gazeto, se ĝi presus en fino (tamen antaŭ la anoncoj) *rebusojn*, kies solvo estus presota ĉiam en la sekvanta numero, kune kun nomaro de l' solvintoj. Pro efektivigo de tiu ĉi modesta propono (kies akcepton per la redakcio mi esperas) mi sendas almetate tri rebusojn por presi.

Kun alta estimo Szegzárd (Hungarujo) ne Novembro 1898.

Paŭl Lengyel.



Informejo de esperantistoj.


Korespondado.

— S-ro *Rud. Sperl*, k. k. Beamter en *Leoben*, antaŭurbo Waasen 20, en Stirujo (Steiermark), estanta membro de la Societo por la propagando de l' Esperanto kaj I. C. 76, respondas *ĉiam* esperantajn leterojn.

— S-ro *Georgi Oreškov*, Telegrafestro en granda *Tirnov*, Bulgarujo, deziras korespondadi kun esperantistoj de ĉiuj landoj; amas kolekti diversajn antikvistajn objektojn: poŝtsignojn, monetojn, ilustraciojn pejzaĝajn, fotografaĵojn, k. a.; havas, por elŝanĝi, poŝtsignojn de Bulgarujo, Aŭstrujo, Germanujo k. c., kaj havas plenan Esp. lernolibron bulgaran por vendi.

— La nova adreso de s-ro *Ilarion Rajĉef*, mitnicestro (= *chef de la douane*: depagejestro) estas urbo *Ahielo* (apud Maro Nigra), Bulgarujo.

— Korespondadi kun esperantistoj de ĉiuj landoj deziras s-ro *S. F. Polanskij* en *Habarovsk* apud la rivero Amur (Sibirujo Orienta).



Elegio.

Mi unu kaj sola sur vojon eliras:
Silika la voj' tra nebulo briletas;
La nokto trankvilas; dezerto trankvilas.
Kaj stelo kun stel', briletante, parolas.

Solenon, mirindon enhavas ĉielo;
Dormetas la tero en lumo blueta.
Sed kial mi sentas doloron, enuon?
Mi ion atendas, ĉu ion bedaŭras?


Nenion atendas de l' vivo mi nune,
Ne estas domaĝa al mi la pasinto.
Agrablon kaj pacon mi volas kaj serĉas:
Mi volus forgesi; mi volus ekdormi.

Sed ne per malvarma dormego de tomba
Mi volus ekdormi en plena forgeso.
En brust' al mi tremu la fortoj de vivo,
Spirante, la brusto leviĝu trankvile.

Ke voĉo agrabla pri amo kantadu,
Kaj mian orelon senĉese dorlotu,
Ke kverko malluma, verdante eterne,
Sin supre fleksiĝu, mallaŭte bruetu.

Bediĉev, Rusujo, Junio 1898.


Trad. Julius Levik.



Rebusoj.

(De *Paŭl Lengyel*.)

I.



II.


Sercaj demandoj.

- 1) Kie estas la komenco de l' eterneco?
- 2) Kie estas la mezo de l' senfineco?
- 3) Kie estas la fino de l' mondo?

III.

- inko
- ludi
- arko
- lasta
- aŭ
- ajlo
- fero
- lui

Antaŭ tiujn ĉi vortojn oni metu literojn por fari aliajn vortojn el ili, — tiel, ke la almetotaj literoj (legate de supre al mal-supre) donu la nomon de unu eminenta viro.



Adresaro de niaj abonantoj 1898.

(Daŭrigo.)

La numero, metita antaŭ ĉiu nomo, estas tiu numero, sub kiu la abonanto estas enskribita en la abona libro.

Aŭstrujo—Hungarujo.

440. **Benkő Denés.** *Erzsébetváros.*

Brazilujo.

445. **A. Caetano d'Azeredo Coutinho.** *S. Anna do Pirapetinga, Minas Geraes.*

Francujo.

455. "La Plume Sténographique", direktoro s-ro F. Canet. *Limoges.*
489. **Sibourg,** pharmacien. *Livron (Drôme).*

Germanujo.

441. **Fraŭlino Olga Chrennikoff,** Studentin phil. Friedrichsstrasse N:o 131 D III Etage, bei Frau Reinicke. *Berlin.*

Holando.

474. **Nooteboom, Aug.** *Watergraafsmeer* bij Amsterdam.

Italujo.

475. **Rossetti, Carlo,** sottotenente di Vascello R. N. Urania. Ministero della Marina. *Roma.*

Rusujo.

442. **Arsenev, Aleksandro.** *Buturlinovka* (gub. Voronej).
461. **Berezovskij, N. N.** Viborgskaja Naberejnaja 27—29. *S. Peterburg.*
444. **Chuikov, Nikolaj.** Troickij prospekt, dom Gartman. *Arĥangelsk.*
450. **Ĉerniak** (membro de la Smolenska filio de "Espero") Mejdunarodnyj bank. *Smolensk.*
452 kaj 462. **Dvukraev,** doktoro. Blagoveščenskaho oficerskaho lazareta. *S. Peterburg.*
477. **Ĉvalaĥov, A. M.** Muĥskaja Progimnazija. *Pjatigorsk, Terskoj Oblasti.*
459. **Fedorov, A. T.,** buĥhalter. Tovaristĉestva Novoj Ljnjanoj Manufaktury. *Kostroma.*
446. **Filio de la societo "Espero"**. v pomiščennii Kreditnaho Obščestva, por s-ro N. P. Lesli. *Smolensk.*
448. **Izaev, E. D.** Ministerskoje Uĉiliŝĉe, selo *Versnij-Baliklej* (gub. de Astraĥan).
480. **S-rino Ivaŝĉenko, A. P.** Per adreso generalo P. A. Ivaŝĉenko, vil. *Voronej* (gub. de Ĉernigov).
465. **Kaĥanov,** podporuĉik Mariinskaja ulica, d. N:o 4. *Gatĉino* (Peterburskoj gub.)

476. **Kakurin, Lev Ivanoviĉ.** St. *Kizil-Arvat.* Zakaspijskoj ŝel. dorogi.
471. **Kirillov, Aleksandro.** Molorossijskaja N:o 30. *Odessa.*
463. **Kisieleviĉ, A. A.** Baltijskoj ŝelzornoj dorogi derevnja Staro-Panovo, sobstvennaja daĉa N:o 30. *St. Zigovo.*
460. **Kodtrovskij, E. B.,** voennij inĝeniero. *Revel.*
482. **Kondakov, Sergej Ivanoviĉ.** Lesnoj sklad. *Melitopol* (gub. Tavriĉeskaja).
447 kaj 484. **Laskin, V.** Progimnazio. *Roslavl.* [4 ex.].
456. **Lesli, N. P.** por la Filio de la societo "Espero". Obščestva Vzaĵmnaho Kredita. *Smolensk.*
473. **Lunin, Vladimir Viktoroviĉ.** Kirpiĉnaja ulica, kvart. Klimovskoj N:o 76 (Kubanskaja obl.). *Ekaterinodar.*
472. **Malevanski, Flor Ivanoviĉ,** uĉitel. gub. Podolskaja. Duĥovnoje Uĉiliŝĉe. m. *Tirov.*
481. **Podrjabinnikov, Ivan Nikolajeviĉ,** buĥhalter. Gorodskoj Obščestvennij Bank. *Melitopol* (gub. Tavriĉeskaja).
468. **S-rino Postnikova, M. A.** Uĉitelnica nemeskaho jazika ĵenskoj gimnazii. *Habarovsk.*
464. **Sapfirskij, N. I.** Upravlenie Voinskaho Naĉalnika. *Roslavl* (gub. de Smolensk).
454 kaj 469. **Sapoĵnikov, M.** Kontoro de inĝeniero I. F. Kurovskij. *Kaŝira* (gub. de Tula).
479. **Sapoĵnikov, Vladimir Ivanoviĉ,** Gorodskija Bojni, *Moskva.*
467. **Savickij, A. G.,** podesaul. Ussurij-skaho kazaĉjaho vojska. *Habarovsk.*
453. **Skirmunt, Nikolaj.** Glavnij telegraf. *S. Petersburg.*
457 kaj 485. **Slucki, Greguar.** *Elisavetgrad.*
478. **Smirnov, N.** Bassejnaja 25. *S. Peterburg.*
483. **Sobennikov, Petr Aleksejeviĉ.** *Taŝkent.*
449. **Teterev, Aleksandro** (sekretario de la Smolenska Filio de "Espero"). Redakcio de "Smolenskij Vjestnik". *Smolensk.*
460. **S-rino Tiĥmenjeva, A. P.** Pegamoid Nevski, 50, per Anna Feodorovna Polnickaja. *S. Peterburg.*
451. **Vilenkin** (membro de la Filio "Espero"). Agenstvo Kontory "Nadejda". *Smolensk.*
486. **Vonski, S. M.** Bulvarna ul. N:o 15 *Nikolajev.*

Svedujo.

- 470. **Fjellner, J.**, beklädnadsförvaltare vid Flottans civilstat. Ronnebygatan 24. *Karlskrona*.
- 458. **Holmquist, Ossian**. Johannesgatan 13. *Upsala*.
- 438. **Sterner, Mauritz**, fil. kand. *Tomarp*.

Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj.

- 448. **Duff, Alex.** 304. E. 98 str. *New-York*.

Ŝanĝitaj adresoj de abonantoj.

- 12. **Krulikovskoj, Henriko**. Provjantskaja 8—10. *S. Peterburg*. Rusujo.
- 68. **Kijkov, Aleksej Aleks.** Spasskaja ul. N:o 15. *Tomsk*. Rusujo.

- 231. **Abesgus, M. M.** Banque Industrielle de la Russie Méridionale. *Sofia*. Bulgarujo.
- 48. **Rajĉef, Ilarion**. limdepagejestro (mitnica oficestro). *Ahielo*. Bulgarujo.
- 310. **Charvin, J.**, juge de paix. *Beaufort*. (Savoie). Francujo.
- 311. **French, E. D.** *Saranac Lake*. N. Y. U(nuigitaj) Ŝ(tatoj) A(merikaj).
- 312. **Grünfeld, A.**, Med. Stud. Hospitalnaja ulica N:o 8. *Kiev*. Rusujo.

Poŝta abonanto.

- V. **Anders Roswall**. Stureplan 5. *Stockholm*. Svedujo.

ANONCOJ.

Ŝignetojn esperantistajn laŭ priskribo de s-ro Beaufront (vidu L. I. 1896. N:o 2) preparas kaj sendas ĉien juvelisto **H. Ŝtalberg**, Rusujo, Estl. gub. **Vezenberg**, Peterburga str. 97.

La *arĝentan* signeton, kun pinglo aŭ kun ringeto (jetono) por rubl. 1:50 (mi petas ĉiam alskribi kiel oni deziras), la *bronzan* (kupran) por rubl. 0:50. Ĉiuj signetoj estas oritaj. La bronzajn mi preparas nun ankaŭ kun vera emajlo kaj tial mi devis plialtigi la prezon. Mi akceptas monon de ĉiuj landoj, sed ne povas akcepti poŝtsignojn krom rusaj. La transsendo kostas aparte kaj ekzemple en Rusujo je la maniero kiel mi povas sendi, ĉu en letero aŭ en kesteto de 14 kop. komencante, en alilandojn de 20 kop. komencante.

I. Semizorov en Astraĥan, Rusujo, 4 uĉ. 11 ok. d. N:o 133, deziras akiri la "*Esperantiston*" por la jaroj 1890, 1891, 1892 kaj 1895 kaj la librojn n:o 25, 45, 50 kaj 51 por mono aŭ ŝanĝe je aliaj objektoj.

Ĉiu, kiu sendos al mi leteron en esperanto, metitan en oficiala poŝtkuverto de lia lando, ricevos responde de mi *senpage kaj afranke* ne malpli ol 10 diversajn bulgarajn poŝtmarkojn. Adreso: **M. M. Abesgus**, Banque Industrielle de la Russie Méridionale **Sofia**, Bulgarie.

Enhavo de tiu ĉi numero.

	paĝo		paĝo
Al ĉiuj abonantoj de la gazeto . . .	177	<i>El Ŝevĉenko</i> (poemo) de <i>S. Sviridov</i>	188
Iaj pensoj pri rifuĝo al la oferemeco de la esperantistaro de <i>P. Nylén</i> . . .	179	<i>El Nova Kaledonio</i> . II. de <i>E. Bardoulet</i>	188
Projekto pri rusa-esperanta gazeto . . .	179	<i>Ŝtelistaĵo</i> de <i>A. Ebner</i>	192
Novajoj	180	<i>La patro</i> de <i>H-g</i>	194
Nia celo de <i>Hj. Bäckström</i>	184	<i>Pri la "knallar" kiuj pvolis rovi la pafilon</i> de <i>P. N.</i>	196
<i>Arteco de lingvoj</i> de <i>K. Ostanieviĉ</i>	185	<i>Koro de patrino</i> de <i>G. Slucki</i>	196
<i>Al la demando pri la traduko de Vorto Dia en lingvo internacia</i> de <i>V. Shmurlo</i>	185	<i>De niaj abonantoj</i>	197
<i>La bezono de unu nova Mecenato</i> de <i>I. Rajĉef</i>	186	<i>Informejo</i>	198
<i>La nova jaro</i> (poemo) de <i>K. Boguŝeviĉ</i>	187	<i>Elegio</i> (poemo) de <i>J. Levik</i>	198
<i>Universala sistemo de mono</i> de <i>Nath. Kyhler</i>	187	<i>Rebusoj</i> de <i>P. Lengyel</i>	198
		<i>Adresaro de niaj abonantoj 1898</i> (daŭr.)	199
		<i>Anoncoj</i>	200

Kun tiu ĉi numero estas dissendita Almetajo, sciiganta la rezulton de la alvoko de s-ro K. Ostanieviĉ danke al polemiko de rusaj gazetoj.

Al Amikoj Esperantistoj.

Eble Amikoj Esperantistoj volos ekkoni la rezultaton de mia alvoko, dissendita kune kun la decembra N:o de "Lingvo Internacia" 1897.

La rezultato superigis mian atendajon. Kvankam nombro da leteroj kun rektaj respondoj estas malgranda, tamen sufiĉa por provi al la mondo, ke "Novoje Vremja" kaj aliaj malamikaj je nia afero gazetoj *imagas al si*, ke ili komprenas tion, pri kio skribadas.

Krom la alvoko, mi samtempe faris ankoraŭ la sekvantan provon: mi priskribis en lingvo esperanto peterburgan superakvaĵon, kiu okazis en Nov. de 1897 jaro kaj dissendis la korespondajon al 7 esperantistoj, petante ilin traduki kaj ekpresi en siaj gazetoj. Jen rezultato. Suprenomita priskribo estis ekspresita en gazetoj:

1) Itala: "Lega Lombarda", N:o 327, la 7 Decembro; tradukinto s-ro doktoro Marignoni, sed redaktoro de tiu ĉi gazeto *ne volis* ekpresi, ke priskribo estas traduko de lingvo esperanto, kaj lia legantaro eĉ ne suspektas tion ĉi. Mi poste skribis al li protestante, sed ne ricevis respondon. Mirinda maniero *silentigadi* nian aferon!

2) Sveda: "Stockholms Dagblad", N:o 554, la 29 Novembro; tradukinto s-ro V. Langlet;

3) Portugala: "O Commercio do Porto", N:o 306, la 26 Decembro; tradukinto s-ro doktoro Costa e Almeida. Du lastaj gazetoj ekpresis, ke korespondaĵo prezentas tradukon de esperanto;

4) El Parizo s-ro Gaston Moch respondis, ke mia korespondaĵo malfruiĝis, kaj superakvaĵo jam estas priskribita en lia gazeto per propra peterburga korespondanto.

5) El Hispanujo s-ro doktoro Serapio respondis, ke li ne ricevis mian leteron.

6) El Danujo s-ro redaktoro Toksvig respondis nenion, kvankam li mem petadis pri korespondaĵoj!

7) El Ameriko s-ro Geoghegan promesis traduki kaj ekpresi en kelkaj gazetoj, sed mi ne scias, ĉu li plenumis sian promeson.

Tiamaniere el 7 da pafoj, faritaj per malsperta mano je unua fojo, atingis la celon 3.

Nun mi petas ĉiujn malkredulojn respondi al mi je sekvanta demando: mi konas nek lingvon italan, nek svedan, nek portugalan kaj komencis lernadi lingvon esperanton pli serioze en Februaro de 1897 jaro, kiam mi fariĝis membro de la societo "Espero", se mi komencus samtempe lernadi eĉ unu de suprenomitaj lingvoj, ĉu mi povus en Novembro ekskribi en ĝi eĉ kelkajn senerarigitajn frazojn?

Unuan buŝan interparoladon mi havis kun s-ro V. Langlet; kvankam niaj parencaj lingvoj multe diferenciĝas, ni paroladis tute libere. Tutaĵo konvinkigis min, ke esperanto efektive estas *miromirinda*, kaj ni esperantistoj estis blindenaskitaj, kiuj per ĝi subite ekvidadis la belan mondon, kaj nenio mirinda, ke aliaj blinduloj ne kredas al ni, kiam ni komencas rakontadi pri niaj novaj impresoj.

Jen nomaro de Amikoj Esperantistoj, kiuj respondis rekte je miaj demandoj:

1) V. Gernet, Odessa, Rusujo. 2) Paul Nylén, Upsala, Svedujo (fot.).
3) A. Kofman, Odessa. 4) Alma von Gedda, Fiskeboda, Åsta, Svedujo.
5) Magnus Nordensvan, Kuopio, Finlando. 6) A. Arnold, Odessa. 7) Il. Rajčef, Vidin, Bulgarujo (fot.). 8) René Lemaire, Epernay (Marne), Francujo. 9) ? Subskribo ne legebla, Leipzig, Germanujo. 10) N. Rodionov, Niĵni-Novgorod, Rusujo (fot.). 11) J. Socha, Feldsberg, Aŭstrujo (fot.). 12) V. Rejler, Rjazan, Rusujo. 13) H. Štalberg, Revel, Rusujo. 14) M. Rakitski, Orŝa, Rusujo. 15) I. Charvin, Bonneville, Francujo. 16) L. de Beaufront, Paris. 17) Costa e Almeida, Rezende, Portugalujo (fot.). 18) K. Petrijaevskij, Saratov, Rusujo (fot.). 19) ? Subskribo ne legebla, Buturlinovka, Rusujo.
20) V. Šmurlo, Tomsk, Rusujo. 21) V. Vojde, Antverpen, Belgujo. 22) M. Goldberg, Narovla, Rusujo. 23) I. Moskovčenko, Raĥni Lesovije, Rusujo.
24) T. Ščavinski, Melitopol, Rusujo (fot.). 25) L. Fredberg, Mellerud, Svedujo.
26) A. Pesockij, Kremenčug, Rusujo. 27) Frolov, Kremenčug. 28) K. Ivanov, Kremenčug. 29) Ellert Johnson, Jerna, Svedujo (fot.). 30) R. Geoghegan, Tacoma, U. S. Ameriko. 31) Radvan Ripinskij, Lodejnoje Pole, Rusujo.
32) H. Norin, Perstorp, Svedujo (fot.). 33) E. Isajev, Verĥne Baliklej, Rusujo.
34) V. Ĥlebnikov, Kazan, Rusujo. 35) M. Abesgus, Baku, Rusujo (fot.).
36) Louise Loisy, Louhans, Francujo. 37) R. Sperl, Leoben, Aŭstrujo (fot.).
38) P. Dombrovski, Kovno, Rusujo. 39) G. Chavet, Louhans, Francujo (fot.).
40) D. Rojdestvenskij, Kalmicko Balkskoje, Rusujo (fot.). 41) E. Roux, Grenoble, Francujo (fot.). 42) E. Zabilon d'Her, Lyon, Francujo. 43) A. Smith, Thouars, Francujo (fot.). 44) Albano de Magalhães, Rezende, Portugalujo (fot.). 45) C. Krarup, Kopenhagen, Danujo (fot.). 46) P. Cvetkov, Aleksandropol Erivan, Rusujo. 47) E. Blanjean, Bruxelles, Belgujo. 48) E. Arduin, Bordeaux, Francujo (fot.). 49) V. Langlet, Valla, Svedujo (fot.).
50) Jos. Jamin, Bruxelles. 51) L. Vandersleyen, Bruxelles. 52) Abbé Solis, St. Hyacinthe, Kanadujo (fot.). 53) N. Evstifejev, Verĥneudinsk, Rusujo.
54) N. Kuŝnir; Smolenski; V. Spektor; Gančarski, Teplik, Rusujo. 55) Jezi-
erski, Volkovisk, Rusujo. 56) C. Hodgson, Northcote, Aŭstralio (fot.). 57) E. Bardoulet, Nouméa, Nouvelle Calédonie. 58) F. Lorenc; A. Riegl; T. da Silva, S. Feliciano, Brazilujo. 59) P. Lengyel, Szegzárd, Hungarujo. 60) Bogdanof, Sofia, Bulgarujo (fot.). 61) K. Klimov, Kazan, Rusujo (fot.). 62) F. Brych, Jozefstadt, Bohemujo (fot.).

Al ĉiuj tiuj Amikoj, kiuj provis, ke esperantistoj komprenas sin reciproke ne sole skribe sed ankaŭ kore, kaj subtenis min morale, mi esprimas mian plej koran dankon.

La enhavaro de ricevitaĵ per mi leteroj estas tre scivolinda. Precipe frapis min unu letero de rusa vilaĝano, kiu ellernis esperanton sen helpo de aliaj esperantistoj. Letero ekskribita ne en sufiĉe bona stilo, sed se oni sendus tiun ĉi leteron al iu ajn alilanda simila esperantisto-vilaĝano, tiu ĉi lasta tute ĝin komprenus. Unuvorte la kolekto estas tre interesa, kaj montros al niaj posteuloj kiel pensadis kaj skribadis iliaj antaŭuloj, jen mi petas ankoraŭ unufoje ĉiujn, precipe malnovajn esperantistojn, sendadi al mi leterojn kaj fotografaĵojn, memorante, ke ili skribas ne al mi sed al nia komuna afero.

Kun saluto kaj estimo.

K. Ostanieviĉ.

Russie. St. Petersbourg. Station Télégraphique Centrale.